Eleanor Farjeon,

# Lumas mateno

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Lumas mateno kiel komence,
Kanto de merlo, laŭdo de Di'.
Dank' por la kantoj kaj la mateno„
Danku nin Dion por ĉio ĉi.

Falas pluvgutoj sunlumigitaj,
Kuŝas unua ros' sur la gres'.
Dank' pro la Dia spur' en-ĝardena,
Benas la Teron Dio sen ĉes'.

Mia la suno kaj la mateno!
Bril' de Edeno aperas al mi.
Danku ni Dion, danku senlime!
Ree salutas la lum' ni de Li.

*Traduko de la Angla poemo "Morning has broken" de* Eleanor Farjeon *(∗1881-02-13 – †1965-06-05) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2014-06.*

*Arg-986-2178 (2014-07-17 15:45:43)*

Eleanor Farjeon,

# Morgenlicht leuchtet

*tradukita de Jürgen Henkys*

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Traduko de la Angla poemo "Morning has broken" de* Eleanor Farjeon *(∗1881-02-13 – †1965-06-05) en la Germanan de* Jürgen Henkys *(∗1929-11-06).*

*Arg-986-1988 (2014-07-17 15:05:56)*

*La teksto de la germanigo kaj la muziknotoj troviĝas en* `http://www.tritonus.eu/Chorsaetze/Morgenlichtleuchtet.pdf`*. Pri la tradukinto vidu la reteon* `http://de.wikipedia.org/wiki/JΓërgen_Henkys`*. La teksto kun la muziknotoj troviĝas ankaŭ en la germana protestanta eklezia kantlibro, sub la numero 455. La kanto estas kantata laŭ la melodio de la gaela kristnaska kanto „Leanabh an àigh“ (infano de l' ĝojo), kiun verkis ls skota verkistino Mary MacDonald (1789 - 1872). Vidu:* `http://en.wikipedia.org/wiki/Morning_Has_Broken` *respektive* `http://gd.wikipedia.org/wiki/Solas_na_Greine`*.*